

# *Kajeroj* *el la Sudo*



BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ (HALE)



Nº 18 - APRILO - MAJO - JUNIO - 1993



## BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ (HALE)

**Sidejo:** Strato Sol, 75. E-41003-SEVILLA (Hispanio).

**Prezidanto:** Manuel López Hernández

**Apertado 369.** 41080-SEVILLA (Hispanio).

\*\*\*

**Sekretario:** Alberto Franco Rom rez

**Sol, 83/85.** 41003-SEVILLA. (Hispanio)

\*\*\*

**Kasisto:** Ramon Menau Torres

**Montseny, 5.-piso.** 08208-SABADELL (Barcelona) Hispanio.

### Redaktoroj de la bulteno:

**Antonio Marco Botella**

**Av.Compromiso de Caspe, 27/29.9<sup>o</sup>.C.**

**50002-ZARAGOZA.** (Hispanio)

\*\*\*

**Miguel Fern ndez Mart n**

**C/Santa Genoveva, 58. 6<sup>o</sup>. C.**

**28017-MADRID.-** (Hispanio)

**Kovrilo:** Pentraĵo de Joan Mir . Dum tiu ĉi jaro oni omaĝas ĉi tiun pentriston okaze de la centjara datreveno de lia naskiĝo.

### Enhavo:

Internacia Jaro de la Tutmondaj Indiĝenaj Popoloj . . . . .	3/ 4 /5	Pg
Forpasis Amador Diaz . . . . .	6	"
La fanatikismo, kiu ne laciĝas . . . . .	7-8--9-10-11	"
Bonvolu ridi...sed ne trol . . . . .	13-14	"
Kie regas kaj rezidas la kalifo . . . . .	15-16	"
La Movado en kaj ekster Iberio . . . . .	17-18	"
Aŭguro por la baldaŭa komenciĝonta jarcento . . . . .	19	"
Financa Raporto . . . . .	20	"
Lirikaj Paĝoj . . . . .	21-22	"
Administra Angulo . . . . .	23	"
La Ĝenerala Asembleo de HALE . . . . .	23	"

# Internacia Jaro de la Tutmondaj Indiĝenaj Popoloj



Per tiu titolo la Generala Asembleo de la Unuiĝinta Nacioj proklamis la jaro 1993 dediĉita al indiĝenoj. La celo estas fortigi la internacian kunlaboradon por solvo de la problemoj, en kiuj troviĝas la indiĝenaj popoloj pri aspektoj tiel gravaj kiel la homaj rajtoj, natura medio, kulturo, edukado, evoluo sano...

Dum multaj jaroj konsiderataj "primitivaj", viktimoj dum jarcentoj de terura diskriminacio, prirabitaĵoj de siaj naturaj posedaĵoj, la popoloj sur propra grundo kaj nutromedioj ekspluatitaj pri sia artoj por alies profito kaj ofte forigitaj perforte de la naskiĝloko kaj kruele kaj malhumantraktitaj, pli ol 300 milionoj da indiĝenoj apenaŭ supervivas, en subpremado far la nomataj "civilizitaj homoj" kaj tamen tiuj indiĝenaj popoloj scias ordigi sian konduton harmonie kun la naturo kaj neniam rompas la bezonatan ekvilibron kun sia naturo ĉirkaŭaĵo. 50 milionoj el tiuj indiĝenoj loĝas en arbaroj ĉi antaŭ jarcentoj, respektante ekologie la medion, en kiuj ili vivas. La neriproĉebla konduto de tiuj indiĝenoj rilate al sia medio estas

imitinda kaj meritis specialan laŭdon de la Rio-Konferenco kiu deklaris en la 22-a principo de oficiala dokumento: "La indiĝenaj popoloj rolas ekzemplodone en la ekvilibra ordigo de la teritorioj, kie ili loĝas. La ŝtatoj devus apogi tiujn popolojn kaj agnoski ilian identecon, kulturon kaj ekologiajn respektemon al la naturo kaj al ilia medio".

Oni kalkulas, ke 75% de la farmaciaj produktoj ellaboritaj en la mondo per vegetaĵoj, inter ili kelkaj bazaj, kiel aspirino, digitalo kaj kinino, devenas el medicinaj vegetaloj kreskantaj ĉe triabaj regionoj. Fakte, la tradiciaj resanigistoj kun sperto kaj scio, uzis dum jarcentoj la plej multajn el tiuj kuraciloj nun uzataj de la moderna medicino... Plej granda parto de nia baza nutrado: terpomoj, lentoj, tomatoj, maizo, kakao, fazeoloj, pizoj, sukero, ktp. estis origine kulturataj de indiĝenaj popoloj, al kiuj ni ŝuldas eternan dankon!

Kiam ni parolas pri la indiĝenoj, ni tuj pensas pri la Amerikaj indianoj, sed oni povas mencii ankaŭ multnombrajn aliajn indiĝenajn popolojn loĝantajn de la polusa regiono ĝis Nov-Zelando. Ĉinio kaj Hindujo havas pli ol 150 milionojn da indiĝenoj aŭ membroj de triboj. Bolivio havas 60% da indiĝenaj loĝantoj, kaj simile okazas ĉe Peruo aŭ Gvatemalio. Oni distingas pli ol 5.000 indiĝenajn grupojn, kiuj havas kulturojn, religiojn kaj sistemojn ekonomiajn kaj sociajn nekredibly diversajn...

Jam de longe, la indiĝenaj popoloj rezistas kaj protestas kontraŭ la maljusteco, kiun ili suferas, kaj klamas por pli justa kaj homama traktado por siaj kolektivoj. Nun, 12 indiĝenaj organizoj estas agnoskitaj de la Ekonomia kaj Socia Konsilio de la Unuiĝintaj Nacioj. La Internacia Jaro de la Indiĝenaj Popoloj, de ili petita ĉe UNO, havas kiel ĉefan celon krei la jurajn instrumentojn necesajn por garantii iliajn aspirojn kaj supervivadon. Novaj asocioj ĉe la nomata "civilizita mondo" jam solidare tiusence laboras por helpi ilin. La elekto de la indiĝena indianino Rigoberta Menchu Tum kiel ĉi-jara Nobel-premiito pri la paco ankaŭ estas simbola sankcio pri la rajtoj de tiaj popoloj al tiu ĝenerala agnosko.

Inter la aspiroj, kiujn la indiĝena gento celas, substrekindas: memregado; protekto kontraŭ perforto kaj forro



bo; agnosko de la propra tero, de la kulturo de la lingvo kaj ĝenerale de ĉiuj homaj rajtoj de la individuo; respekto al ilia natura loĝnido, kiun freneza kontraŭekologia politiko de la evoluantaj riĉaj landoj detruas senkompense; jura rekono de la cititaj homamaj valoroj antaŭ la internaciaj instancoj per publika Universalaj Deklaro garantianta por ĉiam tiuj rajtojn.

Ĝis nun nur la Internacia Organizaĵo pri Laboro (OIT) estis pionira pri juraj agnoskoj de kelkaj el tiuj rajtoj: En 1957 ĝi aprobis dokumenton, kiu difinas la indiĝenajn popolojn "la unuaj loĝantoj de teritorioj submetitaj al kolonia regado". En 1989 tiu sama institucio rekonis per dokumento: "ke kia estas la jura situacio de tiuj indiĝenaj popoloj, ili ja rajtas konservi ĉiujn siajn instituciojn sociajn, ekonomiajn, kulturajn kaj politikajn". Ambaŭ dokumentoj agnoskas la rajtojn de tiuj popoloj elekti propran vivsistemon kaj ekonomiajn vivkondiĉojn, kaj kontroli do siajn proprajn naturrimedojn...

Gravas, ke ni, laboristoj-esperantistoj, konsciigu la ekziston de tiu grava konsciencia problemo en la mondo pro la gento forgesita en obskuraj anguloj de nia planedo, kies minimumaj rajtoj kiel homoj ankoraŭ ne estas rekonitaj.

Gravas, ke certaj etnismaj gazetoj kaj kolektivoj, same proklamantaj defendantoj de etnismaj principoj, anstataŭ siaj dediĉoj al naciisma ekzaltado surbaze de hipotezaj propraj vidotoj (fakte naciismaj apologioj), helpu kaj verku specialajn pri tiuj indiĝenaj popoloj, ankoraŭ nun kruele subprematajn kaj urĝe bezonantajn ĉiajn helpojn, instigante homojn kaj instituciojn kontribui al plej kontentiga solvo.

Gravas, ke ni kunigu niajn fortojn, ne nur por la rekono de la rajtoj de tiuj indiĝenoj, sed ankaŭ kontraŭ la forlarabo de ties teritorioj kaj sekva ekspluatado fare de sovaĝa kapitalismo, kiu jam minacas eĉ la ekzistadon sur nia planedo.

*Ni viglu kontraŭ la agresantoj de la Naturo! Ni fanian eblon en la Internacia Jaro de la Indiĝenoj por ke ankaŭ la homaj rajtoj trafu tiujn popolojn!*

*La Redakcio.*

## Forpasis Amador Diaz

Kun vera bedaŭro ni sciigis pri la forpaso de nia kamaado kaj amiko Amador Diaz Eleizalde, okazinta la 6-an de marto 1993, viktimo de apopleksio.

Aktiva esperantisto loĝanta en Anglio, kunlaboranto de nia revuo per multnombraj artikoloj, el kiuj la lasta titolita "Aŭguro por la baldaŭ komenciĝonta jarcento" aperas en tiu numero mem, Amador estis unu el la plej interesaj dialogantoj. Kiujn mi konis lastatempe, ne nur ĉar amikema, sed ankaŭ ĉar li sciis aŭskulti kaj ĉiam estis sufiĉe bone dokumentita pri multaj problemoj sociaj kaj politikaj okazantaj aŭ okazintaj en la mondo.

Filo de elstara vaska esperantista pioniro, li sekvis fidele la paŝojn de sia patro kaj tre aktivis en nia Movado Serene, li multe amis Vaskolandon kaj Hispanion, kaj estis eĉ cepta atestanto pri historiaj eventoj de la hispanaj interokcidentaj milito kaj postmilito, kiam la protagonistoj movis la fadenojn de la politiko tra Londono, kie li loĝis, kio ebligis lin kontakti kun eminentaj homoj ĉefrolantaj en la hispana dramo dum 1936-1939.

La Esperanta Movado en Anglio sendube perdas gravan aktivanton. Malaperis grava kunlaboranto de "KAJEROJ" krom ankaŭ de "Sennaciulo". Mi perdas esperantistan kamaradon kaj amikon, kun kiu mi plezure konversaciis, kiam ni renkontiĝis en Esperantaj Kongresoj. Mi ĉiam rememoros lin kun la nostalgio pri persono estimata, kiu ĉiam havis preta diron agrablajn kaj temon interesan.

Al lia vidvino, Muriel, kiun mi malfeliĉe ne konis, "KAJEROJ" kaj mi persone sendas nian sinceran kondolencon.

A. Marco

# La fanatikismo, kiu ne laciĝas...



Barraca valenciana.

Jam plurfoje mi verkis en pluraj esperantistaj revuoj pri la naciismo, tiu kontraŭaktuala neraca doktrino, kiu, envolvita en certaj mistikismaj ideoj de 1' pasinto, kiam ĝi radikaliĝas, ĝi murdas, detruas kaj disvastigas malamon kaj morton. Kiel tiu nuntempe triste fama sur Jugoslaviaj teroj.

Ekzistas aliaj formoj de sama doktrino, prezetataj antaŭ la civitanoj kiel rajtoj propraj tute netuŝeblaj, kiuj tamen envolas agresemajn atakojn tute netolereblajn kontraŭ alies rajtoj. Mi aludis nun pri certa "Rezolucio" aperinta lastatempe sur paĝoj de kelkaj esperantistaj revuoj, subskribite de kelkaj sinjoroj sin nomantaj "etnistoj", kvankam tiu nomo povus esti efektive difinita per alia substantivo pli konkreta esprimanta la veran karakteron negativan de tiuj "redemptistoj". La tezo de tiu "Rezolucio" estas, "certa esperantista asocio ne devas uzi en esperanto-takstoj la kastililingvan nomon Valencia por aludi al la urbo kiu gastigos la UK en 1993".

Verŝajne, tiuj sinjoroj, volas ignori, ke la kulturo kaj la lingvo de Valencilando ne estas ununura. Mi, vere, ne scias kial, ekzemple mi, Valencilano, ne devenanta de pluraj (multaj) generacioj de valencianoj, kaj denaske parolanta la kastilian lingvon, ne devas skribi Valencia, kaj Juan, kaj Alicante la solaj esprimoj por tiuj substantivoj skribataj kaj parolataj en nia Valencilana regiono dum jarcentoj. Mi ne bone komprenas en la nomo de kiaj etnismaj principoj oni volas malpermesi, ke mi parolu kaj skribu en mia denaska lingvo. Mi bone scias, ke ni estas membroj de lingva minoritato en Valencilando, sed ĉu tiu fakto pravigas ilin mallegitimi mian rajton paroli kaj skribi per mia lingvo? Ĉu tiuj sinjoroj sentas nostalgion pri la abomena politiko de certa diktatora generalo kaj volus silentigi mian lingvan minoritaton? Ĉar tio estas ja kio esence ili subskribis en tiu neracia "Rezolucio"! Kial oni devus laŭtigi antaŭ la tutmondaj esperantistaj kongresanoj nur la figuron de Ausias March kaj ne tiun de mia najbara frato, la poeto Miguel Hernández, kiel mi, Valencilano, kaj, kiel mi, parolanta la kastilian lingvon? Ĉu via "Rezolucio", resp. etataj sinjoroj, estas la komenco de persekuto de lingva minoritato? Ĉar tio estus tiel, vi devus klare kaj publike proklami vian intencon ne per defendaj vortoj, sed per la aŭtentaj agresemaj vortoj esprimantaj viajn sentojn.

Mi ne bezonas vian respondon, sed invitas vin respondece mediti pri via neracia "Rezolucio". Laŭ mia opinio, temas pri fanatikisma reago nur ek-

plikebla ĉar certaj naciismaj ideoj blindigas viajn mensojn. Kelkaj el subskribintoj estas amikoj miaj, talentaj homoj, kiujn mi estimas kaj respektas kaj ne mencias sur ĉi tiuj paĝoj por ne hontigi ilin, ja neniam estas glora sinteno agresi kontraŭ minoritatoj!

Kaj rilate al la Valencia kulturo montrinda al la kongresanoj de UK, ankaŭ aludita en tiu bedaŭrinda "Rezolucio", mi opinias oportuna ne nur verki pri la kulturo de la subskribintoj, sed ankaŭ pri tiuj aliaj kulturo kiuj donis gloron al la Valencia popolo laŭlonge de la historio. Jen kiel mi kaptas la okazon por aludi pri unu el ili speciale brila: tiu florano en Al-Andalus (Iberio) dum la mezepoko, kiu en Valencio akiris grandan prestiĝon: mi parolas pri Valenciaj poetoj kaj Poezio, skribita per grandaj litero

Permesu do al mi menciigi grandajn poetojn naskiĝintajn kaj forpasintajn en Valencilando. Unue ni citu la eminentan Ibn Jafäya, naskiĝinta en Alziro la jaro 1058. Tiu poeto verkas poezion prikantantan la belecon de la Valencio bedaro, de la pejzaĝoj, de la ĝardenoj kaj de la floroj de tiu regiono senegalaj, tiel majstre, ke baldaŭ oni konis lin per la alnomo "al-ĉänan" (la ĝardenisto). Li kreis en la al-andalusa poezio ĝenron kompareblan nur kun la Orienta priflora poezio, verkita de la brila siria poeto Sannawbari (\*). Tamen ekzistas nenia dubo pri la fakto, ke Ibn Jafäya ne imitas tiun nek aliaj orientajn poetojn, ĉar lia poezio montras absolutan originalecon tuj distingibile en ĝia konsisto. Jen unu el la multnombraj poemoj montranta la karakterojn supre indikitajn:

### Standardo de juneco

Danku ni la belajn horojn  
kaj memoru ni la tagon,  
kiam mi haltadis ĝoja  
sub la ombr' de verd-arbaro.  
Norda vento l' arbojn lulis  
kun la dolĉ' de bebo-kanto,  
kaj ni sentis nin ebriaj  
pro la kvera kant' de amo  
de kolomboj tutliberaj,  
kiuj pozis sur la branĉoj.  
Tie ni tre amuziĝis,  
staris la junec-standardo,  
kie ni sur plezurŝipo  
ĝuis kiel en ŝaŭm-akvo  
naĝas steloj en la brumo  
de la Lakta Vojo-padoj...



Tie kunfanditaj restis  
la lavenda parfumaĵo,  
la birdkanto dolĉjubila  
kaj la delikata ĉarmo  
de freŝeta milda brizo,  
karesantaj niajn vangojn.  
Blanka, okulfrape hela  
la ĝardeno: florzizaĝo;  
l' akvo: freŝa buŝ' invita;  
l' ombroj: fask' da nigraj haroj.  
Ĝuste tie la kolombo  
lasis aŭdi nin la ravon  
de mirinda melodio  
per la kvera dolĉa kanto.  
Aro da belegaj floroj  
vibris pro la ĝojsensaco  
vidi l' kreskan kvaronlunon  
ĉe la sunsubira parto;  
ŝajnas lun' orkoliero  
sur mantel' de nub-brodaĵo  
ridetanta al la belo  
de l' vesper' kaj de l' arbaro.

Kelkaj kritikistoj laŭdis la lertecon de Ibn Jafäya por priŝkribi  
noktajn impresojn kaj tial alnomis lin "poeto pri la nokto", sed problemoj pro  
spaco ne permesas al mi reprodukti unu el tiuj poemoj(\*\*).

Jafäya tutkore amis sian landon, sian regionon, sian naskiĝurbon  
Al ĉiu el tiuj amoj li dediĉis belajn poemojn. Al sia lando li diris:

### Al-Andalus, eterno-paradizo.

Ho vi, gent' de Al-Andalus,  
kiel vi feliĉa estas!  
Akvo, ombroj, rojoj, arboj,  
tia paradiz' eterna  
nur en ĉi patri' ekzistas,  
en alia lok' ne eblas.  
Se mi devus elekti,  
tiun ĉi, vi estu certa,  
ke elektus mi plezure:  
ĉar ne estas ter' pli bela!



Ho, ne timu!, en l' inferon  
oni ja ne punenfermas  
la personojn nun ĝuantajn  
paradizon plej eternan.

Kaj al sia naskiĝurbo, Alziro, Ibn Jafäya kantis ĉiam kun fervoro kaj amanto, bele kaj ĉarme, kiel en ĉi tiuj versoj:

### Al mia Alzira tero

Al la voko nostalgia,  
al kver-eño de kolomboj  
kun fervoro mi respondas  
en la vesperiĝa horo.  
Kaj eklarmas mi korpreme  
kun nekonsolebla ploro,  
ĉar mi tute ne rezistas  
la Alziran am-elvokon.  
Kaj mi emocie diras:  
"Iam, se mi tion povos,  
mi revenos al Alziro  
por mildigi kor-angoron,  
ĝui la malnovan liton,  
vagi tra la val' kaj rojoj,  
rigardante la montetojn,  
kiuj kovras sin per roso  
kaj tuj poste malaperas  
en la klaroj el sun-oro.  
De ĉi tie mi rigardas  
la ĉielojn de l' estonto  
por percepti fulmo-brilon,  
kiu el si mem lumfontos".

Ĉiu belajo de Valencio aperas lirike desegnita per lia lerta mano, sed la logika nesufiĉa spaco de revuo devigas min ne reprodukti la poemojn kantarajn la belecon de la albufero (\*\*\*), de la riveroj, de la nokto, de la maro, de la ĝardenoj...

Ibn Jafäya kreis skolon, kaj la influo de la "jafäya stilo" ne nur faris ĝis prestiĝa, sed estis ĉiam admirata. Sur la muroj de la Granada Alhambro ankoraŭ restas pecoj de liaj belaj poemoj. Li forpasis en la jaro 1138.

Post Ibn Jafäya venas en la vicoj de niaj komentoj Ibn Zaqäq, nevo de Jafäya kaj daŭriganto de lia "ĝardenista skolo". Li naskiĝis en Valencio ĉ.

Jaro 1093. Lia poezio sekvas la vojon de lia onklo kaj majstro rilate la pri-  
 kribon, sed la stilo de Zaqqāq montras atentindejn pozitivajn ŝanĝojn: pli  
 delikatajn nuancojn, renovigon de la metaforo-bildoj kaj la starigon ene de la  
 poemo de kvazaŭkolokvoj. Zaqqāq kreas la fikcion de homo pensanta, kiu eniras  
 en la kernon de la poemo kaj analizas, komentas, konkludas. Jen unu el liaj  
 poemoj:

### Bela lekanto.

Jam vekigis brila suno,  
 kaj eklumas nova tago,  
 kun l' aŭror' per ĉaro venas  
 faskoj da orlum' kaj sango.  
 Tiam vigla vinverŝisto  
 vinplenigis la pokalojn,  
 mirtoj verŝis surĝardenen  
 siajn plaĉajn aromaĵojn,  
 kaj la bel' de anemonoj  
 logis la kunbabilantojn.

Diris mi duonmistere:  
 -Kie trovi la lekanton?  
 Kaj tuj la ĝarden' respondis:  
 -Ĝin mi lasis, sen eraro,  
 sur la belaj dentoj blankaj  
 de la vinverŝisto-knabo.  
 Kaj fariĝis tombsilento,  
 ĉar ne eblis la konstato.

Neis tuj la vinverŝisto  
 havi tian flordonacon,  
 sed apenaŭ liaj lipoj  
 malfermiĝis pro l' diraĵo  
 la mister' senvualiĝis:  
 falis el la buŝ' lekanto!

Bedaŭrinde mi ne povas reprodukti eĉ unu solan poemon po ĉiu ĝenro de  
 tiu ĉi granda poeto, ĉar evidente la artikolo tro longiĝus... Ibn Jaqqāq  
 forpasis en Alziro en la jaro 1135.

Alia granda Valencia poeto de tiu epoko estas al-Rusafi, naskiĝinta  
 en Ruzafu de Valencio, urbeto plena de ĝardenoj apud la granda urbo. Li naski-  
 ĝis ĉ. la jaro 1141 kaj, li forlasis la urbon jam adolta, li neniam forgesi-  
 ĝin kaj ofte mencias en siaj poemoj Ruzafon, ponton Ma'an, la albuferon kaj



aliajn belaĵojn de sia naskiĝurbo. Jen poemo, en kiu li bone esprimas tiuj sentojn:

### Valencia elegio.

Ho, amikoj! Kion havas ĉi dezert' sen viglo certa,  
ke subite ĝi pleniĝis de aromoj plej misteraj?  
Kion havas la rajdantoj, kies kapoj preskaŭ svenas,  
oni dirus, ke ebriaj, pro elvokoj plej korprenmaj?  
Ĉu disiĝis moskparfumo ene de zefiro freŝa  
aŭ prononcis iu l' nomon de la Valenci' eterna?  
Ho, amikoj! kun mi haltu, ni parolu bonvolemaj,  
nia elvokem' satigu per menci' de lokoj revaj:  
ja Rusaf', la svelta Ponto kaj aliaj nenombreblaj.  
Tie neston mi ja havis, mian flugon premieran,  
tio estis la patrio, tagoj miaj adoleskaj,  
kie mi unuafoje vestis juntunikon belan...  
Nun ni sen ornamoj vivas, kvankam l' urb' belege restas

Hejm' unua de juneco, ne permesu Dio bona,  
ke forgesos mi la urbon, kies bildon nun mi tenas  
en la fund' de mi gardata, kun fervoro plej intensa.  
Ter' alia ne ekzistas pli aminda kaj modela,  
kiun la zefir' provizas per parfumbareloj plenaj,  
dum per mosko, or' kaj floroj tero-vangoj arĝentecas  
profilante vojo-bordojn ĝis Lakta Voj' ĉiela.

Gaja kiel vivtrezoro. Rava kiel rev' anĝela.  
Iu tiam al mi diris:-Tio paradizo estas!  
Kaj mi haste tuj replikis:-En ĉi tiu mond' ne eblas  
trovi lokon pli allogan por la paradiz' surtera  
ol la Valencia tero, kiun amas mi tenera!  
Estas Valenci' smeraldo kaj river' el perloj helaj,  
fianĉin' de Di' kreita por juneco-don' eterna!

Valenci' konstante ĝuas el la klara lum' matena,  
ludas tie sun' kaj maro, kaj kun brizo albufera.  
Ventoblovoj per la floroj al la steloj ŝtonojn jetas,  
kaj pro tio la demonoj al la urbo ne plu venas...ktp.

Kial la aŭtoro metis en la titolon la vorton elegio, se la poemo estas  
la plej kompleta panegiro, kiun mi iam legis, dediĉita al Valencio? Nur la  
lastaj versoj inklinigas nin pensi, ke temas pri elegio kaj ne pri panegiro.  
La poemo estas sufiĉe longa kaj havas obskurajn angulojn sub lirike vidpunkto.

tiom da, ke mi preferis ne reprodukti ĝin komplete. Kiam la poemoj de al-Rusafi estas mallongaj, tiam pli klare montriĝas la simileco de lia poezio rilate tiun de liaj antaŭuloj Ibn Jafäya kaj al-Zaqqäq, sed la certeco pri la trolongeco de ĉi artikolo decidigas min aperigi eĉ ne unu. Al-Rusafi forpasis en Malago en la jaro 1177.

Kompreneble, restas ankoraŭ multaj aliaj Valenciaj poetoj de tiu epoko, kiujn mi ne povas eĉ mencii, kaj por alia okazo restas por eventuala publikigo poemoj kaj biografietoj de Ibn Labbun, Sad al-Jayr, Abu-l-Hançhäh de Almusafes, Ibn Abbar, k.a.

Mi petas senkulpigon al niaj legantoj, ĉar mi miksis etnismajn problemojn kun kulturo kaj lirikaĵoj rakontoj. Du temoj malsimilaj, sed ne kunigaj, mi ambaŭ temojn.

Antonio Marco Botella


\*\*\*\*\*

\*\*\*\*\*

(\*) Sanawbari: Brila siria poeto, elstara en la priskribo de floroj. Li forpasis en la jaro 945.

(\*\*) Tiu ĉi artikolo estas parto de 20-paĝa eseo aperonta en mia verko "Liriko en Al-Andalus" sub formo de simpla ĉapitro.

(\*\*\*) Albufero: Marlago ne profunda inter sablokordono kaj la plaĝo. Tema pri sablaro okupita de la maro pro pluraj motivoj. Fama la Valencia albufero de 34 km2.



## Bonvolu ridi... sed ne tro!



Du verkistoj konversacias kaj unu diras la alian:

-Ho, malfeliĉo! terura sortobato trafis min, mia filo ludante bruligis la manuskripton de mia plej laste verkita romano.

-Kiom aĝa estas via filo?

-Li estos baldaŭ kvar jara.

-Nekredeble, kaj jam tiel inteligenta!

00000

# Bonvolu ridi... sed ne tro!



En butiko de skribvaroj.

Sinjoro demandas promenanton pri kie estas butiko de skribvaroj.

-Sinjoro, en tuj proksima strato estas unu, sed mi konsilas al vi serĉi alian.

-Kial sinjoro?

-Tial, ke la vendistino estas tre timida kaj vi perdos multe da tempo.

-Ne gravas, mi bezonas nur kajeron!

La naiva viro eniras en la vendejon:

-Bonan tagon, sinjorino!

-Ne tute bona, estas malvarme.

-Jes. Nu, mi volas kajeron.

-Ĉu nur kajeron? Ni havas ĉion pri papero.

-Dankon, sed mi bezonas kajeron!

-Ĉu por knabo aŭ knabino?

-Estas same.

-Tute ne, sinjoro. Se por knabo, kun kovrilo verda; kun roza lora, se por knabino.

-Nu, por knabo.

-Ĉu kun spiralo aŭ sen spiralo?

-Bone, kun spiralo.

-Ĉu kun linioj aŭ kvadratoj?

-Kun kvadratoj.

-Ĉu milimetrika aŭ....

Tiam eniras viro kun necesabo surŝultre, kiu malesperede ekkrias: -Sinjorino, hieraŭ mi montris al vi mian pugon, mi montras al vi mian necesabon... sed mi rediras al vi, ke mi volas ajnan paperon!

Maria Fernanda.

# Kie regas kaj rezidas la kalifo?

## Kelkaj difinoj

Antaŭ nelonge, okaze de verkado de artikolo pri la historio de Valencio, mi alfrontis leksikan problemon rilate la kalifon de Kordovo. Kiel estas eble klare kaj neambigue esprimi mi en Esperanto jenajn kvar konceptojn:

1. la rango, digno, moŝteco de la kalifo; 2. la politika reĝimo kaj religia doktrino, kiujn li reprezentas kaj defendas; 3. la lando, teritorio aŭ regiono sub lia jurisdikcio kaj regado; 4. la domo, en kiu funkcias liaj oficoj kaj servoj, kaj en kiu li rezidas. Unue, mi konsultis kelkajn vortarojn por kompari difinojn. Diccionario General Ilustrado de la Lengua Español de Manuel Alvar Ezquerro informas, ke califato signifas: 1. digno de kalifo; 2. tempo, en kiu daŭris lia regado; 3. teritorio de lia jurisdikcio; 4. historia periodo, en kiu estis kalifoj. Ŝajnas, ke mankas en la kastilia lingvo vortformo por la oficloko kaj rezidejo de kalifo. E. Tudela Flores, en sia Vocabulario Español-Esperanto, tradukas califato per "kalifeco" kaj "kalifejo" kaj "kaliflando", sed li ne precizigas, ĉu "kalifejo" kaj "kaliflando" estas sinonimoj aŭ ĉu ili esprimas du diversajn nociojn. Rimarku, ke la nomoj de du aliaj muzulmanaj regantoj, sultan kaj emir estas tradukitaj per "sultano" kaj "emiro" respektive sen pluformado.

## 'Plena Konfuzita Vortaro'

Oni rigardu, ĉu Plena Ilustrita Vortaro (PIV) jetas iom da lumo sur la demandon. "Kalifeco" estas difinita kiel "rango kaj moŝteco" de kalifo. Tio estas akceptebla. Mankas vortformo indikanta la registemon kaj doktrinon, kiu apogas ĝin, sed tio estas facile esprimebla per aldono de la sufikso "-ismo" al la radiko: "kalifismo". Poste, troviĝas en PIV "kalifejo" difinita kiel "lando regata de kalifo". Same ĉe la kapvorto "sultano", la pluformita vortformo "sultanejo" estas "lando regata de sultano". Pri la teritorio administrata de emiro, islamisma guberniestro aŭ princo, PIV silentas, sed en ĝia Suplemento (1987) estas informoj, ke Kuvajto, Kataro kaj Omanbordo estas emirlandoj. Fine, venas vera anomalio; la regiono regata

de imamo, muzulmana religia kaj politika suvereno, ne estas "imamejo" sed "imamujo"! Kial okazis tiu malsimetrio?

Plua trakribado de PIV rivelas pli da similspeca konfuzo rilate pluformadon de radikvortoj signifantaj regantojn en aliaj partoj de la mondo. La nocio de regata teritorio estas esprimita jen per aldono de la sufikso "-ej" (reĝejo, princejo, banusejo, ĥanejo), jen per la sufikso "-uj" (princujo, prefektujo, vojevodujo, episkopujo). Pro tiu nekonsekvencan vortformado, estas pravigebla rebaptado de PIV kiel "Plena Konfuzita Vortaro".

### El la brumo venas la lumo

Malgraŭ la ambigua uzado de "-ej" kaj "-uj" en la ĉi-supre cititaj ekzemploj, la difinoj de la du sufiksoj en PIV kaj ankaŭ en Plena Analiza Gramatiko (PAG) klare indikas unu sencecon. Laŭ PIV "-ej" estas loko difinita por io aŭ karakterizita per io (lernejo, kuirejo, preĝejo), dum PAG donas al ĝi la signifon de domo (operejo, oficejo, poŝtejo) kaj de loko kie oni funkcias. La difinoj en PIV de la sekvaj vortoj en ĉi-lastaj kategorioj reliefigas, ke "-ej" estas speco de konstruaĵo (dekanejo, episkopejo, magistrato, ministrejo, monaĥejo, parlamentejo, paroĥestrejo, prefektejo, pretorejo, prezidentejo, senatejo).

Male, "-uj" estas lando loĝata de la popolo montrata de la radiko; tiu ĉi signifas ankaŭ landanon (Francujo, Anglujo, Polujo). Ankaŭ ne gentnomaj radikoj estas uzeblaj sammaniere. PIV registras "patrujo" kun la difino "lando, rigardata kiel apartenanta al iu nacio, pro tio, ke ĝi estas la lando de la patroj kaj de la avoj de la nacioj", kaj "Esperantujo" kiu estas "la ideala lando de la Esperantistoj". Plej okulfrapa en PIV estas la registro de jenaj du vortparoj: "prefektujo/prefektejo" kaj "episkopujo/episkopejo", pluformitaj en tute nekonsekvencan manieron. Jen la difinoj:

prefektujo: regiono, administrata de prefekto

episkopujo: lando, havanta episkopon kiel suveronon

prefektejo: domo, en kiu funkcias la prefektaj servoj kaj oficoj

episkopejo: palaco de episkopo

Analogie estas eble formuli difinojn de "kalifujo" kaj "kalifejo".



kalifujo: lando, regno aŭ teritorio, kies suvereno estas kalifo

kalifejo: sidejo de kalifo, domo aŭ palaco, kie li rezidas kaj plenumas la funkciojn de sia ofico

### Konkludo

Estas rekomendinde, ke la redakcio de la nuntempe revizita PIV kaj ankaŭ kompilantoj de aliaj Esperanto-vortaroj konsultlibroj ĝustigu la artikolojn pri "kalifo" kaj ĉi aliaj regantoj kaj administrantoj, anstataŭigante vortojn erare havantaj la sufikson "-ej" per vortoj pluformitaj per "-uj" aŭ kunmetitaj per aldono de "lando" aŭ "regno" al radiko.

Bernard GOLDEN



## **La movado en kaj ekster Iberio**

### Reeldono de gramatiko.

Post elĉerpiĝo de la unua eldono, -"Heroldo de Esperanto" reeldonis la gramatikon de Fernando de Diego "Nuevo Método de Esperanto para clases y autodidactas". Tiu ĉi gramatiko bezonas ja novan prezenton. Racie verkita per moderna metodologio, ĝi havas kiel lernobazon tre bone elpensitajn dialogojn kaj la sekvaj tradukoj havas la garantion, ke ili estas faritaj de la plej bona tradukanto en Esperantio: Fernando de Diego.

La gramatiko, 214-paĝa, estas same profitebla por gvidado de Esperanto-kursoj kiel por memlernado. La prezo, 1.100 Pto

\*\*\*\*\*

### Traduko kaj publikigo de grava verko.

Jus aperis "El Esperanto: fenómeno de la comunicación" la hispana versio de la Aulda "La fenomeno Esperanto". La libron -125-paĝan, buntkovrilan kaj modern-aspektan tradukis s-ano Marcos Cruz, responsulo pri la CO de HEF, kaj eldonis Madrida Esperanto-Liceo subvenciite de la Hispana Kultur-Ministerio dank' al senlaca demarŝado far Lupe Sanz.

Trafa enkonduko en la lingvan problemon; brila argumentado pri la taŭgeco de nia solvo; alloga prezento de la lingvo konsisto de Esperanto, de la historio de ties movado kaj literaturo. Jen la plej rimarkindaj kaj varbo-cele konvinkaj trajtoj de la originalo, kiuj en la elstara transpono de Cru konserviĝas kaj eĉ pliriĉiĝas per abundaj notoj liajplumaj.

Mendoj ĉe: Esperanto-Liceo de Madrid; Atocha, 98. 49 28012 MADRID. Prezo de ĉiu ekzemplero 1.300 Ptoj, inkluzive de sendokostoj por Hispanio. Pli ol 5 ekz. ricevas 20-procenta rabaton. Nepras antaŭpago per poŝtmandato.

\*\*\*\*\*

Murcio. Oferto al objetantoj kontraŭ militservo.

Universitata Asocio Esperantista "Rosetta" de tiu ĉi urbo sin proponas per senpaga servo al esperantistoj en la tuta Hispanio dezirantaj akiri la situacion "objetanto al militservo". pretigi la dokumenton necesan tiucele, kondiĉe ke la interesatoj subskribos la koncernan kontrakton indikante konstantan adreson en klubo de la respektiva loko.

Interesatoj bonvolu urĝe kontakti per telefono S-ron Pedro Antonio Macanaz, telefonnumero 968/ 23.12.19 prefere je la tri postagmeze.

\*\*\*

La nunjara "Fraŭlino Esperanto-1993".

En la "Centre Civic de la Creu Alta" oni festis la prezentadon fare de José M. Galofré, prezidanto de KAE, de la nunjara "Fraŭlino Esperanto-1993". Estas Mónica Valdosera i Tarrés, 19-jara studentino de la dua kurso pri Instruado kaj esperantistino. La aktivistino estis tre elstara kun ĉeesto de vastpubliko, en kiu troviĝis la naŭ ja elektitaj "Fraŭlinoj" de aliaj Asocioj de la urbo kaj komarko.

Dum la festeto, fraŭlino Ingrid Gosset i Sánchez ĉesis en sia rolo de Fraŭlino Esperanto kaj Fraŭlino Sabado por la jaro 1992.



Mónica Valdosera.

# Aŭguro por la baldaŭa komenciĝonta jarcento

Mi ricevis leteron el Paragvajo kaj tuj sciis la devenon. La letero estis de V-, amiko, kiu loĝas en Asunciono. Ni tre malofte renkontiĝas, kompreneble. La lasta fojo estis en Barcelono, en 1990, kiam ni ambaŭ vizitis tiun urbon. La letero enhavis vortojn, per kiuj li deziris feliĉajn tagojn por la festa sezono kaj la nova jaro. Je la fino li skribis majuskle: "Memoru miajn vortojn en Sants!". Sants estas la centra fervoja stacio, kie ni adiaŭis. Per tiuj lastaj vortoj li avertis min pri la nigraj tagoj kiuj, laŭ li, tiam komenciĝis. Mi ne intencas ripeti tion, kion li diris, sed ŝajnas, ke liaj konjektaj vortoj realiĝas. Se oni rigardas al la lando Paragvajo, liaj avertoj ŝajnas iom superfluaĵ, ĉar tie eventoj ne ŝanĝiĝas rapide. Okazas subitaj ŝanĝoj de respublikaj prezidentoj, sed tio ne influas la ĉiutagan vivon de la popolo. La lasta ŝanĝo estis tiu de Andrés Rodríguez en februaro 1989, kaj tiuj, kiuj antaŭe vivis mizere, ankoraŭ vivas mizere.

La nunaj sociaj ŝanĝoj en aliaj landoj, ne nur de Sud-Ameriko sed de la tuta mondo, ĝenerale, estas vere grandaj. Dum niaj konversacioj en Barcelono en tiu somero ni tuj emfazis la kreskon de senlaburoj en ĉiuj landoj kaj, en iuj, kiel en Brazilo, la situacion socian, ĉefe en la grandaj urboj, kun kvartaloj, kie la leĝo estas tiu de la

plej lertaj pafiluzantoj. Eĉ Usono, la lando, kiun ĉiuj opinias imitinda, havas urbojn kun kvartaloj, kie la krimo regas. Televiziaj ĉenoj montris al ni dum semajnoj antaŭ la elekto de la nova prezidento, bonvestitajn, ridetantajn homojn salutantajn kandidatojn, sen iu ajn zorgo pri la ĉiutaga vivo, krom ke iliaj subtenatoj gajnu la balotadon. Neniam ni vidis la amason da negroj, hispan-amerikanoj kaj indiĝenaj indianoj, kiuj vivas en statoj kaj kvartaloj tute malsimilaj al tiuj de la kandidatoj.

Eĉ Eŭropo, rigardata kiel kontinento kun akceptebla grado de toleremo nun komencas, iom zorge, rigardi kun timo eblajn sociajn erupciojn, kaj oni libere komentas pri citaĵoj. Pli kaj pli ni aŭdas pri enmigraĵoj, oficialaj kaj ne, fare de homoj el landoj ĝis antaŭ nelonge submetitaj al la hegemonio de la eksa Sovetio, kaj al aliaj kontinentoj, en Okcident-Eŭropon; ni aŭdas pri la sangaj eventoj en Jugoslavio, pri la kreskanta kvanto da senlaburoj. Ni povas grandigi ĉi tiujn citaĵojn tute facile ekster Eŭropo.

Paralele al tiuj homamasaj problemoj venas aliaj tre gravaj: la ŝanĝoj de la terklimate kaj tuja sekvo en la erozio kaj dezertiĝo de multnombraj regionoj de nia planedo kaj speciale en Afriko. Tiu ĉi dezertiĝo estas la plej ofte menciita

kiel tragedio, ĉar ĝi pli facile videblas ol tiuj de Azio, Ameriko kaj Aŭstralio. La kontraŭ-dezerta agado en Israelo estas tre malgranda por ekvilibrigi la negativan faktan progresadon de la aluditaj dezertiĝoj. Plua grava ŝanĝo estas la nuna rapida forbruligo de la ĝangalo en Amazonio. Ni jam scias, ke la malapero de grandaj ĝangaloj ne donas longtempajn surfacojn por terkulturado, sed, male, fine la maldikan feblan tavolon de tero, sen la stabiligantaj radikoj de la arboj, forblovas la ventoj, kaj novaj dezertoj aperas.

La aŭguro por la baldaŭ komenĉonta jarcento ne estas bona. Krom pri iaj ankoraŭ ne bone konataj faktoroj, kiel la ozonaj tavoloj kaj la malkresko de glaciaj surfacoj en la polusoj, onirajtas

konjekti kaj timi pri la kreskanta monda homamaso en urbegoj kiel Meksiko, São Paulo, Rio-de-janeiro, kaj aliaj en Eŭropaj nacioj. Baldaŭ ekaperos nova jarcento kaj certe la aŭguroj por ĝia naskiĝo ne vekas optimismajn sentojn kaj esperojn. Tamen mi memoras tiujn vortojn de amiko V., dum ni kaftrinkis en Las Ramblas de Barcelono: "Tiuj, kiuj postvivis la jarojn de la Triobla Alianco(\*) postvivos ion ajn".

*Amador Díaz*

(\*) Milito de la Triobla Alianco estis tiu de Paragvajo kontraŭ Argentino, Brazilo kaj Urugvajo (1865-1870), kiam miliono da paragvajanoj mortis kaj nur sepcent mil postvivis la teruran katastrofon.

## FINANCA RAPORTO POR LA PERIODO 1.992

### KONTO-ETATO PRI LA REDAKTEJO EN 1992.

Saldo favora al HALE je la fino 1991. . . . .	31.651,-
Enspezoj de Abonantoj, laŭ "Kajeroj" . . . . .	<u>12.300,-</u>
Sumo	<u>43.951,-</u>

### ELSPEZOJ DUM 1992:

Poŝto, ekspedo kvar numerojn =	6.202,-	
4 inkobendoj-forviŝbendoj =	6.000,-	
Poŝto: sendo de korektoj =	2.400,-	
Presejo: 4 x 6120 Ptoj =	<u>24.480,-</u>	
Sumas	39.082,-	<u>39.082,-</u>

Saldo je la jarfino favora al HALE 4.869,-



# LIRIKAJ PAĜOJ



## NASKIĜOJ

Tiele,  
el korpo kontraŭ korpo,  
pluge,  
mi.

Korpo min strebis -frapo  
antaŭen-, dua korpo al mi venis  
-frapeto retren-. Ili  
en mi fariĝis mia korpo- pluge, pluge-.  
Post kunfandiĝ', distiro.

Iro  
de unu korp' al la alia.  
Ĝermo  
de infinit' kaj bluo.

Rendevuo  
ĉe l' infra luko de la mond' inversa.  
En interplekto -tempo kaj la manoj.  
Kaj eskapcelaj piedbatoj ĉe la limoj.

Lumoj

kaj verboj en ascendo  
al okulparo talpa,  
al oremparo sole scipovinta  
pri la obtuz', mian heziton venkis.

Helo.

Fine mi trafis mian rendevuon:  
naskiĝis!

Tiele,  
el lumoj kaj el ombroj,  
mikse,  
mi.

Lumo: patrino: fluoj:  
fluo de am' radika,  
flu' de tenero en serena fluso,

fluo lilie lakta, kiu limfis  
-likva manao, ambrozio-

serĉe  
al sorĉa font' por sin elverŝi buŝen  
en ŝpruco prujne pura, plurfadena.

Lumo: parolo: vortoj:  
la patraj dormo- fabloj kaj fabeloj  
aŭ kavalkad' al la magio,  
farboj,

kiam la tempon stampis  
blindumoj kaj koloroj.

Lum': la saĝo,  
spros' de liber -mia libero!-

Ombro:  
la blinda devo.

Ombro: la altrudo  
eltrinki la kalikon de l' teruro  
kaj pento-fari pro mil falsaj pekoj  
-kion mi ĉiam spitos-.

Pleja lumo  
-averse- kaj -reverse- pleja ombro:  
amo.

Kiam la amo -mia am'- enrompis  
en mian centron, oni min forŝiris  
de ŝi -de ŝiaj brakoj-  
per vip' el agonio,  
la pordon haste fermis  
per cent jarcentoj da rigliloj,  
ele  
min lasis: ene dio blasfemadis.  
Mia ĉelar' panikis: mi naskiĝis.

Tiele,  
senĉese suferante la sovaĝan sturmon  
de l' homa klaroskuro,  
mi volus nure ĉerpi aŭ distili  
esencon violonan aŭ diantan  
aŭ de fontana plaŭdo,  
de muzikskatoleto,  
de baletpaŝo, de galanta gesto,  
de rido de infano,  
de ĵus plukita rozo, kiun mi proponas

al vi.



Kaj ni foriras,  
elglitas plenkonsente  
kverante, lante, kune, ĉirkaŭprene,  
el ĉi skurgad' bestia,  
el ĉi vortic' angora,  
el ĉi pelmel' absurda al la nudo

-simplo-,

en kiu ni naskiĝos.

Miguel Fernández Martin

Noto de la Redakcio.- Ĉi verko ricevis <sup>\*\*\*</sup>Honoran Mencion en la  
32-aj Internaciaj Floraj Ludoj.

\*\*\*\*\*

\*\*\*\*\*

## Administra angulo.

Pagis sian respektivan ĉi-jaran abonon jenaj k-doj:

Nicolas López Escartin . . . . .	800,-	Ptoj
Esperantista Societo ESTO . . . . .	800,-	"
Jaime Benito Cedo . . . . .	1.000,-	"
Enrique Navarro Rubio . . . . .	1.000,-	"
Lorenzo Noguero Sarasa . . . . .	1.000,-	"
Antonio Mairal Cabero (Francio) . . . . .	2.400,-	"
H.E.F.A. (Barcelono) . . . . .	800,-	"
<b>SUMAS PAGO DE ABONANTOJ</b>	<b>7.800,-</b>	<b>"</b>

## La Ĝenerala Asembleo de HALE

Laŭ nia Statuto, oni alvokas ĉiujn gekamaradojn al la 6-a ordinara asembleo de nia Asocio, kiu okazos en Valencio paralele kun la Uk, laŭ la jena

### TAGORDO:

1. Legado kaj eventuala aprobo de la protokolo de la antaŭa asembleo.
2. Legado kaj eventuala aprobo de la bilanco de la jaro 1992.
3. Resumo de aktivaĵoj de la periodo 1992-1993.
4. Informo pri nia organo KAJEROJ EL LA SUDO.
5. Kotizoj.
6. Programo por la venonta periodo 1992-1993: agado ĉe sindikatoj, rilatoj kun SAT, LEA-oj, ktp.
7. Situacio kaj uzo de la havaĵo de H.A.L.E.
8. Elekto de Komitato kaj ĝeneralaj aferoj.

LA PREZIDANTO  
Manuel López Hernández



---

**BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ (HALE)**

---

**REDAKCIO:** Str. Av. Compromiso de Caspe, 27/29. 9ª.  
50002 - Zaragoza (Hispanio)

---